Kiuj estas la estraranoj kaj kiel kontakti ilin?

Prezidanto: Christopher Fettes, Irlando. Oni kontaktu lin skribe (Bloomville, Geashill, Offaly, Irlando), ekz. kiam vi havas problemojn rilate al pagado de membrokotizo.

Vicprezidanto kaj redaktoro: József Németh, Hungario. Se vi volas kontribui al nia organo, kontaktu lin retpoŝte: jozefo.nemeth@gmail.com.

Vicprezidanto kaj retejprizorganto: Francesco Maurelli, Italio/Skotlando. Se vi volas kontribui al la retejo aŭ havas ideojn por ĝi, kontaktu lin retpoŝte: fran.mau@gmail.com.

Ĝenerala Sekretario kaj Kasisto: Heidi Goes, Belgio. Rilate al membriĝoj, pagoj, ĝeneralaj problemoj ne jam menciitaj ĉi tie... ŝi estas kontaktebla laŭ la sekvaj manieroj:
retpoŝte: teva@ivu.org,
telefone: (el ekster Belgio) 0032 50 675178
(el Belgio) 050 675178,
skribe: Assebroeklaan 2, BE-8310 Brugge, Belgio.

Ĉi tiu faldfolio kostas monon kaj ni ankaŭ konscias pri la medio. Tial ni petas vin, se ĝi ne interesas vin, bv. redoni aŭ pludoni ĝin, ekz. en via loka Esperanto-klubo aŭ al via regiona aŭ landa Esperanto-biblioteko. Ĉi tiu papero havas la Forest Stewardship Council-*etikedon* (FSC – *Konsilio por Arbaradministrado*)*, kiu montras ke la arboj uzitaj venas el arbaroj kie oni regule replantas arbojn.*

La reto…

Ekzistas diversaj lokoj en la reto kie vi povas legi novaĵojn pri TEVA aŭ virtuale renkonti esperantistajn vegetaranojn:

Oficiala retejo:
www.ivu.org/teva

Blogo:
http://www.ipernity.com/home/teva

Yahoo-grupo:
http://groups.yahoo.com/group/E-istajVegetaranoj/

Gastiga reto:
http://www.couchsurfing.org/group.html?gid=19671

Viaj aliĝoj kaj kontribuoj estas bonvenaj!

Nia celo: disvastigi Esperanton inter vegetaranoj kaj vegetarismon inter esperantistoj.

Saluton, esperantisto!

Ĉu vi estas vegetarano?

Se jes, ĉu vi jam estas membro de

Tutmonda
Esperantista
Vegetarana
Asocio?

Se jes, gratulojn kaj dankojn!

Se ne, ĉi tiu faldfolio provos konigi nin al vi...

Ĉu vi havas demandojn...?
Se jes, tuj kontaktu nin!

teva@ivu.org
http://www.ivu.org/teva/

TEVA havas historion...

TEVA fondiĝis la 16an de aŭgusto 1908, sub la nomo *Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj*. Ĝi estas la plej aĝa internacia vegetarana asocio.
En 1914 aperis unuafoje la organo *Vegetarano*, kiu pro la milito ĉesis aperi, kaj poste ankoraŭ kelkfoje reaperis kaj malaperis, sed fine en 1971 reaperis sub la nomo *Esperantista Vegetarano*, kiu ĝis nun aperis neregule, sed sen interrompo.
TEVA estas membro de Internacia Vegetarana Unuiĝo kaj de Eŭropa Vegetarana Unuiĝo, kaj Kunlaboranta Faka Asocio de Universala Esperanto-Asocio ekde 1980.

Ĉu ankaŭ estontecon?

Dum la Universala Kongreso en julio 2008, la estraro de TEVA preskaŭ tute renoviĝis, kaj en aŭgusto 2008 TEVA festis sian centjariĝon.
Tri el la estraranoj partoprenis en la kongreso de *International Vegetarian Union* (IVU) en Dresdeno kaj pluraj vegetaranoj tie interesiĝis pri Esperanto. Por eĉ pli bone disvastigi Esperanton inter vegetaranoj estas necese ke nia membraro kresku. Ekzemple, pli granda membraro rajtigos TEVAn al pli forta voĉo ĉe la voĉdonadoj de IVU. Sed pli da esperantistaj kongresanoj en la IVU-kongreso ankaŭ donos pli grandan ŝancon al la oficialigo de Esperanto dum la kongreso. (Kutime nur la angla kaj la kongreslanda lingvoj estas oficiale uzataj. Pro tio ne-anglalingvanoj malfacile partoprenas la kongresojn.)

Intertempe ni laboris pri nia videblo en la reto: ni kreis Ipernity-blogon kaj grupon ĉe Couchsurfing. Ankaŭ pri disvastigado de vegetarismo inter esperantistoj ni havas ideojn: eldoni internacian vegetaran kuirlibron kaj produkti utilajn aferojn sur kiuj estas la nomo de nia asocio por pli bone diskonigi TEVAn kaj ĝiajn celojn.

Sed, klare... ni ne povas ĉi tion fari sen vi... do...
kiel vi povas kontribui al niaj celoj?
Legu sube kaj apude:

Kiel helpi?

Se vi estas vegetarano kaj membro de via nacia vegetarana asocio, vi povas rakonti al ties membroj pri TEVA kaj pri Esperanto.

Vi ankaŭ povus kontribui al nia organo per verkado de artikoloj.

Se vi planas ĉeesti internacian, kontinentan aŭ regionan vegetaran kongreson aŭ veganan festivalon, vi povas sciigi tion al ni, kaj eble vi povas tie reprezenti TEVAn, rakontante al vegetaranoj pri Esperanto kaj TEVA.

Kaj kompreneble vi povas iĝi membro de TEVA.

Kiel membriĝi?

Membriĝo kostas 20 eŭrojn. Tamen, ĉar ni scias ke en multaj landoj estas homoj kiuj ne povas pagi tiom, kaj iom herede al nia tradicio de libervola donaco, tiuj kiuj sentas ke tio estas tro granda sumo, povas doni al si mem rabaton de 25, 50 aŭ eĉ 75% kaj do pagi 15, 10 aŭ 5 eŭrojn. Se eĉ tion vi ne povas fari, skribu al la prezidanto.

Eblas pagi ankaŭ Dumvivan Membrecon, kio multe helpas al nia agado kaj multe simpligas nian administradon. Vi ricevos niajn sincerajn dankojn, dumvive nian organon kaj belan membrokarton.

Kotizojn kaj eventualajn donacojn bonvolu pagi al la konto **teva-h** ĉe UEA, kun mencio de via nomo; samtempe oni sciigu la Sekretario-Kasiston pri via pago. Ne forgesu sciigi vian adreson kaj se eble retadreson.

En kelkaj landoj la Landaj Reprezentantoj havas propran konton por TEVA, por faciligi la transpagon. Pri tiuj kontoj bv. informiĝi ĉe la Sekretario.

Koran antaŭdankon!